



BIBLIOTEKO ÇÊ LA PATRINA DOMO.

La kurda junulo Ednan Osman Hesen (Kobano, 1990) estas ĉe la pordo de la biblioteko “Rodî û Perwîne”. Tiuj estis la nomoj de liaj frato kaj bofratino. Fakte, li havas perdoplenan vivon. Hejmlande li faris la antaŭuniversitatajn studojn kaj poste li iris en Damaskon por studi juron. Komenciĝis la milito kaj li devis reveni en la naskiĝlandon. Dum la milito apogeis kaj pli kaj pli proksimiĝis, li komencis labori instruante kurdajn lingvon kaj literaturon, ambaŭ malpermesitaj dum jaroj de la registaro de Al-Assad. Dum la Islama Ŝtato proksimiĝis al lia naskiĝlando, li komencis okupi sin pri urĝ-helpla laboro. Aperas multaj nuancoj en la rakonto de la junulo, dum la rememoraĵoj alvenas: “Mi ne ŝatas rememori tiamaĵojn, tiom dolorigaj estas la vundoj kaj cikatroj de tiuj tagoj; sed mi povas paroli kaj mi volas paroli pri la martirigo de mia fratino, estis ŝi mia plej proksima amiko. Tre speciala persono estis Xirin Hassan”.

Septembre de 2014, Hassan estis en la frontlinio; la milita situacio ne povis esti pli komplika kaj, ĉar la Islama Ŝtato ekatakis la urbon, li komunikiĝis ĉiutage kun sia fratino: “La tridekan de septembro mi vokis ŝin, kaj respondis IŜ-ano: “Cian fratino ni ekzekutis. Se ci volas vidi ŝin, hodiaŭ mem ni metos ŝian foton en fejsbuko”. Mi frostiĝis. Mia cerbo paralizigis. Kion fari mi ne sciis”. Ĝuste la komandantaro de la PPT konfirmis tiun teruran novaĵon: “Fine, ok monatojn post la fino de la batalo ni trovis la kadavron de mia fratino en vilaĝo proksima al nia urbo”. La morto de ties plej kara fratino lasis deprimita Hesen kaj li foriris al Amedo(1), konsiderata la ĉefurbo de Norda Kurdio(2).

La rakonto de la junulo ne estas kronologie preciza; envere, pli frue komenciĝis desegni la mapo de turmentoj kaj proksimul-perdoj.

La 11-an de novembro de 2013 oni atakis per eksplodaĵoj la urban sidejon de la Kurda Ruĝa Kruco kaj oni murdis lian patron, kiu troviĝis en la ĉirkaŭaĵo. Sed la teruraĵoj de la milito longdaŭre persekutis liajn familianojn. Post la retiriĝo de la IŜ, inter la 25-a kaj la 26-a de junio de 2015, en bone organizita operaco, la ĝihadistoj sturmis domon post domo kaj mortigis almenaŭ 288 civilulojn. La murdistoj, razitaj kaj maskitaj per uniformoj de la kurda milico, atingis la domon de Hesen. En tiu terura okazintaĵo, ili malvarmsange murdis lian patrinon, la fratino Gulistan, la pliaĝan fraton Ehmed kaj ties edzinon Rihane, alian fraton Rodi kaj ties edzinon Perwin, la geonklojn Mistefa Hemeo kaj Gule Edvisu kaj la kuzojn Osman kaj Ahmed.

Hesen revenis en Kobanon kaj, en tiu domo mem, li starigis bibliotekon: kulturdomo en urbo rekonstruata post la batalo. “Miaj gepatroj amis sian landon kaj sian domon ili havis kiel malfermitan lokon. Ĉiuj povis resti por dormi, manĝi kaj kunveni. La revo de la ĵus geedziĝintaj Rodi kaj Perwin estis malfermi bibliotekon en sia domo”. Post jaro da agado, cele al plenumigo de tiu revo, fine, la 9-an de majo de 2016, li malfermis la bibliotekon. De tiam li estas kolektanta, tie kaj tie ĉi, librojn kaj materialon.

Meze de tiom da ĉagreno Hesen pledas por la bibliofilio, ĉar li opinias, ke ĝi havas grandan valoron por rekonstrui la urbon el homa vidpunkto. “Dum mia vivo mi ofte sentis la solecon, kaj nur la libroj helpis min superi la solecon”.

Li decidis, ke la libroj havas farendaĵon, por ke popolo, kiu ankoraŭ estas lekanta siajn vundojn, kiu ankoraŭ militadas en la ĉirkaŭaj regionoj, povu defendi siajn ideojn: “Por pli bona interkompreniĝo valorus la literaturo kaj la kulturo. Kiel homo mi laboras kontraŭ la subpremado kaj la asimilad-politiko; mian landon kaj mian familion mi volas protekti per la literaturo. Ni ne povas forgesi, ke la Baaz-reĝimo konsideras kiel gravan krimon paroli kaj verki kurde”.

Laŭ lia aserto, la situacio ege ŝanĝiĝis de post kiam aperis asocioj, kiuj agadas favore al disvastigo kaj normaligo de la uzo de la kurda lingvo. Estas lernejoj kaj liceoj, kiuj laboras per tiu ĉi gepatra lingvo ĝis la abiturientiĝo, same kiel ekzistas aliaj, kiuj tion faras kaj en la araba kaj en la aramea. Ne delonge oni malfermis la Roĵavan Universitaton en Kamjŝlo⁽³⁾ kaj la Afrinan Universitaton en la samnoma kantono⁽⁴⁾.

Tamen, li opinias, ke restas multe farenda kaj ke la internacia komunumo devus agnoski la kurdan lingvon kaj la diplomojn kaj klerigon, kiujn en Roĵavo oni akiras per la instruado en tiu ĉi lingvo. Li finis sian konversacion per meditaĵo: “La kurda popolo oferis multajn el siaj gefiloj favore al la humaneco kaj la homaro. Dum multe tro da jaroj oni rifuzis al ni la ekzistadon kaj koloniigitaj ni devis pluvivi. Ni montris al la mondo kiel ni kapablas en la batalejo, kaj nun ni volas montri al ĝi, je kio ni kapablas en la literatura kaj kultura fakoj”.

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):

- (1) Amed (Diyarbakir en la turka).
- (2) Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.
- (3) Qamîshlo.
- (4) Efrîn.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Orsola Casagrande.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 13-an de Septembro 2017-a.

Tradukis: NXC. Februaro 2018-a.

